

PENSEO

N-ro 380

jun. / 2023

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 34-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

Tiberio Madonna (Italio)



Via kaŝita amo

Mia neĝa
arida
fajra dezerto
ne havas sablon
nek blankon
nek ion tuŝeblan
pri kio mi povus skribi, verki, paroli
fantazii...
kaj do mi rakontas
flugojn sen birdoj
paŝojn sen piedoj
ĉielarkojn sen koloroj
en mia libro
sen paĝoj.
En la centro de mia universo
brilas obskura
via animo avara
via figuro fora
kiu lumigas per siaj sentoj
ĉiujn aferojn neekzistantajn
kuŝantajn
en miaj dezirplenaj revoj.
Kaj ĉiu el tiuj aferoj
tute senmove
rondiras
ĉirkaŭ vi
superverŝite
de la lumo nigra
kaj montrante
en ĉiu direkto
sian tristan ĝojon.
Senkompate min tremigas

la lontana varmo apuda
de via animo.
Malproksimo kaj proksimo
perfekte kunfandiĝas.
Nokto kaj tago
estas nur unu afero.
Mia miranta koro
ebriiĝas de l'odoro
de via riĉa
kolora bukedo
sen floroj.
Mia gorĝo soifa
trinkas
la pluvon sekan
falantan
el la nuboj dancantaj
de via animo,
kaj miaj okuloj melankoliaj
pasigas sian tempon legante
en tiu senesprimo
de l'animo
la vortojn sen literoj
skribitajn de via mano.

Moissey Bronshteyn (Rusio)



Floras blanka siringo
en la maja ĝarden' –
estas bela daŭrigo
de la vivo, kaj en

la mondet', kiun limas
mia cirklo de l'aĝo,
mi konvinke proksimas
al la ĉarma pejzaĝo,

do, flarante flaron
kun la ĝua envio,

mi kontrolas horaron
kaj aspiras al vivo.

**

Aspektas la blanka ŝtono
de Jerusalemo
ja kiel natura dono,
kaj la problemo
de la plej taŭga dezajno
estas solvita
per si mem.

Aperas ŝajno,
ke l'konstruita
en la plej proksima nuno,
la urbo prenis
de sia eterna suno
varmon, kaj benis
ĝin kore la sesjarmila
vivhistorio -
konvinka instruo pri la...
fakte, pri ĉio.
Kaj eĉ se la historio
nin ne instruas,
mi tamen estimas nur tiujn,
kiuj konstruas.

**

Du katoj, bone edukataj,
kunvenis por fotado –
katido kun vangetoj glataj
kaj sulkohava kat', do
ĉe diferenco tuj videbla -
komparo apenaŭa
kun rememoro mia febla
pri mi – en kvindek naŭa.

**

Ĉu estas grava la problemo,
ĉu premas la situacio,
se mankas semo por verkemo,
se stagnas verko pro nescio?

Koleg' – kreanto, prenu pace
paŭzeton verkan por amuzo,
kaj certe venos la repag', se
al vi ridetos nova Muzo.

Klaus Frieze (Germanio)



Nekonata belulino

Kiom ofte mi nur preterpasis?
Kiom ofte mi ne vidis vin?
Kiom ofte venis mi kaj pasis?
Tiom ofte regis nur rutin'.
Kiom ofte blinde mi nur paŝis?
Tiel stulta estis mi. Kial?
Ĉu vi vere vin intence kaŝis?
Vi ja kreskas teren' sen vual'.
Estas tempo, plene mi vekigu.
Estas tempo por la tag' de l' ŝanĝ'
Ne demandu, simple nur klinigu!
En herbej' troviĝas la aranĝ'.
Eta plant' kun floro belaspekta,
mankas pomp', sed ĉiam estas ŝik'.
Ne trudema, simple nur ĉarmega.
Ĝuste taŭga por bona lirik'.
Rozkolora Robert-geranio.
En herbej' ŝi estas sinjorin'.
Ŝi briletas ja pro simpatio.
Por la mond' ŝi estas la princin'.
En Eŭropo, ankaŭ en Afriko,
en Azio vivas ŝi kun ĝoj'.
Ankaŭ vi nun estu koramiko.
Trovu ŝin, ŝi estas ĉe la voj'.

Lerta pentristo

Pentristo pensas kaj pensadas
pri nova verk', vera artaj'.
Pentrist' jam laŭte fanfaronas:
Art' ne nur temas pri amaj'.
Pentration bonan faros mi.
Estos plezuro por spektanto
Altir' pro la belec' de ĝi.
Mi famos kiel artkreanto.
Sed eĉ post multaj longaj horoj
mankas ide', malgraŭ la pen'.
Ne plaĉas por l'artist la floroj.
Do, li ekdormas sur l' kusen'.
Dormeto vere helpas lin.

Venas koncepto kaj impeto.
 Kolor' nun estu la karmin',
 koloro por la tuta breto.
 Venontan tagon la pentristo,
 ravita de l' bela malnet',
 li sentas sin vera artisto.

Pli alta estu la budĝet'.
 La bildo estas preta nun.
 Motivo ja ne plu necesas.
 Karmin' signifas ja fortun'.
 Kun bilda kadro ĝi belegas

Wally du Temple (Kanado)



FLOROJ

En la kretaceo
 kantigis amon roze
 kreis poezian prismon
 Tapiŝis mirinde la mondon
 Per la transcenda ama alĥemio
 transformis sunlumon en sukeron.
 Tiele ili kreis luksbankedon da fruktoj
 Poste floroj negocis la helpon de bestoj
 ilian kooperon, dolĉeco por livero al kunulo
 Diversaj animaloj gustumis la sukerojn en fruktoj,
 kaj konvertis dolĉajn mielojn en energion kaj proteinojn.
 tial nova mondo de varmsangaj mamuloj
 ekviviĝis.
 Sen floroj
 sonoriloj
 ne sonorus
 nek
 k
 a
 n
 t
 u
 s,
 vi

Petro Palivoda (Ukrainio)



ROBINSONO

(kantteksto)

La senlima for' senfundas,
 La brueg' de l' mar abundas,
 Ree dezertas horizont'.

Kvankam homojn tre sopiras,
 Vane al la maro iras,
 Vane al la maro iras
 Ĉi-matene Robinson'.

Blankaj ŝipoj ne videblas,
 Kaj espero lia feblas,
 Nur solecas la insulo,
 Ĉirkaŭita de l' nebulo...

Ploras la animo-mevo,
Sed vi kreu je la revo,
Certe prosperos via mond'.
Bluaj ondoj vin karesos,
Ĉio en la viv' sukcesos,
Ĉio en la viv' sukcesos,
Ekridetu, Robinson'.

Venos feliĉega horo —
Returniĝos am al koro,
Ĉar senmortas sento hela
Kaj la vivo estas bela.

Tero de paco

(kantteksto)

Kredu ni je la estonto,
Esperante revu ni,
Certe trans la horizonto
Viglos viv' en harmoni'.

Kiam verda primavero
Floros bele en anim',
Nur antaŭen kun espero
Iru firme vi sen tim'.

Vojeton ni sternu de koro al koro,
Foriĝu el koroj malam' kaj doloro,
Kaj sonu feliĉe por mi kaj por vi,
Por ĉiu sur Tero de pac' melodi'.

Vin atendas via stelo,
Do kuraĝu al la voj',
Birde flugu al ĉielo,
Plena de liber' kaj ĝoj'.

Sur lazura alta ondo
Kanto sonu tra l'eter'
Pri mirinda nia mondo,
Pri belega nia Ter'.

Vojeton ni sternu de koro al koro,
Foriĝu el koroj malam' kaj doloro,

Kaj sonu feliĉe por mi kaj por vi,
Por ĉiu sur Tero de pac' melodi'.



Yohanes Manhitu (Indonezio)



La vento

Mallaŭta, plena de tenero;
kruela, plena de furiozo.
Vi envolvas la teron.

La dian liberecon,
la povon de l' mondo
vi havas sen esti almozulo.

Sed mi revenas

Mi transiris la tempon
sen ia poezio
kiu konsolis min
kun tenero.

Sed mi revenas.
Jes, mi revenas.
Estas dank' al ŝi
kaj ankaŭ por ŝi —
mia konsolantino.

Kia silento!
Kia soleco!
Se mi foriras de ŝi
kaj miaj noktoj estas tiel longaj.

Sed mi revenas.
Jes, mi revenas.
Estas dank' al ŝi
kaj ankaŭ por ŝi —
mia konsolantino.



Jadranka Miric (Serbio)



MI KAJ VI


La sama anim' .
 Ja, sperta rim'
 La samaj sentoj
 Amaj kaj turmentoj!
 la sama karmo.
 Pezas tiu larmo.
 mi kaj vi .
 Jaroj kiel atestantoj
 ke ĉio pasas
 nur espero restas!

Maja kanto

Antaŭ mi staras tiliaro.
 Tremanta estas ĝia foliaro.
 Svinganta pro forta vent',
 ekpensis mi , kun malgaja sent'.
 Verdiĝis densa branĉar'.
 Flugekzerco posttagmeza
 brue kveras kolombar',
 Ĉu flugo peza?
 Vid-al-vide mi
 staris ŝprucfontano.
 Soifaj paseroj sur ĝi
 dividas akvon kun urbano.

Hajka Rondo

Liven Dek (hispanio)



Anim' agordas
 sin por transĉiela mond'
 torijo pordas.
 **
 Torijo kajas
 inter triloj kaj silent',

ĉirkaŭe majas.

Ángel Arquillos (Hispanio)



La hundo miaŭas,
 dum la mastro karesas
 nigran kateton.

Pluvegas timo
 sur la tegmentojn nudajn
 de malriĉuloj.

Di' fosas sulkojn
 por semi tutan mondon
 je tenereco.

Jasmenoj floras
 por blankigi la noktojn,
 kiam printempas.

Bela vetero
 ĝoigas la etoson
 de la malbelo.

Manĝas rabo-bird'
 la putrintan viandon
 kun ĝoj' kaj sen tim'

Elena Popova (Bulgario)



Printempaj sonoj

La pluv' parolas
 mallaŭte kun la Tero.
 Ĉefa donacant'.

La flor' donacis
 al Feb' tason da ĉarmo.
 La birdoj laŭdas.

Printemp' amplena
 interkisas kun vento.
 Tempo por amo.

Sveltaj tulipoj –

glasetoj da roso por
la sun' soifa.

Timaj okuloj.
Sinĝena violeto.
Aroma invit'.

Konvalo – blankaj
majaj sonoriletoj.
Amo – legendo.

Florkrono super
la lerneja pordo. Ja
Tag' de la libro.

Ivanichka Magharova (Bulgario)



Odoras siring'
en la solecaj noktoj.
Malĝoj' pelagas.

Kantas la klavoj
en siringaj belnoktoj.
Amo jam venis.

Gastas malĝojo
en la ĉambro malvarma.
La amo frostas.

Li kaj ŝi marŝas
ĉe l'ŝaŭmantrivereto.
Belas sunsubir'.

La prujno kisis
la rozojn en ĝardeno.
Aŭtuna malĝojo.

Hirundoj ree
venis sub la tegmento.

La kato atendas.

**

Neĝa blovado.
Sur la arbara pado
du paŝojn en neĝ'.

Malgrandaj neĝeroj
milda vintra anoncisto
kisas la teron.

En la fenestro
steloj. Klarneto ĝemas.
Bela neĝa nokt'.

Neĝo. Blus'. Kamen'.
Virino sur la vojo.
L' silent' ekbrilis.

Jen sonoriloj
la subtera pepado
spiro de printemp'.

Autun'. Folifal'.
L' arbar' ree ekdormis.
Oni blankiĝis.

Meznokta bluso
Sur la fenestro frapas.
Luno ĵaluzas.

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Aromo de bulgara rozo

Estis belega somera tago, unu el multaj
similaj, sed samtempe tute alia, ĉar ni devis
forveturi Bulgariion por partopreni nian
unuan UK-n.

Ĉio, kiel kutime okazas unufoje, ŝajnis
bonega, nova, interesa. Samgrupanoj estis
ege amikemaj, ridetemaj, la vojo estis bela,
ĉemara urbo Varna – plej bona el ĉiuj, la
Kongresejo aspektis, kiel plej bona
konstruaĵo.

Kun koro plena je ĝoja sento, ni eniris
Kongreshalon, kie ĉio estis preta por
inaŭgura malfermo de UK.

Feliĉaj vizaĝoj de diverslandaj
esperantistoj, kiuj salutis tiel, kiel oni salutas
bonajn geamikojn, kortuŝis nin.

Brila, preskaŭ suna lumo de lustroj en halo kaj karesema aromo, kiu plenigis kaj kapon, kaj animon, multobligis ĝojan senton. Aromo estis tre trankvila, tenera, nedeviga, same, kiel esperanta etoso dum tutaj kongresaj tagoj. Nenio estas superflua, nenio malagraba, ĉio prezentis bonegajn amikajn rilatojn, ĝojon de samideanoj, belecon de lingva sonado.

La programo, ĉiuj aranĝoj akcelis interkompreniĝon, amon al Esperanto, vekigiĝon de ĉiuj bonaj sentoj.

Dum promonado tra urbo, ŝajnis, ke ĉiuj loĝantoj havis Esperanto-insignojn. Ĉiuj salutis kaj ridetis.

Unu el multnombraj neforgeseblaj memoroj estis konatiĝo kun novgeedza esperantista paro. Ŝi estis el Japanio, kaj li — el tiama Jugoslavio.

Pasis la jaroj, jardekoj, multaj el nia grupo (niaj samlandanoj) partoprenadis diversajn UK-jn, sed ĉiam, kiam mi sentas aromon de Bulgara rozoleo, mi rememoras mian unuan kongrespartoprenon.

Oni diras ege precize, ke en nia vivo ĉiu sento estas ligita kun iu evento. Mi havas multe da esperantaĵojn, memordonacojn, sed flakoneto kun rozoleo restas, kiel videbla kaj sentebla kara memoro de mia unua vizito en Esperantujon.

Elena Popova (Bulgario)

La naskiĝo de la tago

Fajro inundis la ankoraŭ malhelan ĉielon. Super ĝi la nuboj haltis, kiel flugiloj de vulturoj.

Malproksime, tie, kie ankoraŭ dormis akvo kaj ĉielo, ekfloris kampo de kalenduloj kaj dispelis siajn helajn bukedojn sur la ondojn. Ili kunfandiĝis.

La suno naskiĝis. Ĝi ekrigardis supren por vidi kie ĝi estas, sed harabunda mano ĝin duonigis. La mallumo superpendis por

faligi kurtenojn antaŭ la mateno. Kaj la suno pendis — duone supre, duone suben, disŝirita. Ĝi aspektas al mi kiel herbejo, lumigita de kaŝita lumo, aspergita de pluvo. Nun fandita kupro fluis kiel lafo. Aŭ ili estas orfiŝoj?

Ondo etendis arĝentkoloran dorson. Post ĝi alia. Momenton — kaj kun arĝentaj ornamaĵoj, la ĉielo je la senfino sinapogis.

La tago ridetis mire — ĝi ŝanĝis tiom da vestaĵoj, kaj ni ankoraŭ ne vekiĝis...

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Balado sur maro

Maro de arĝento!
Tiel enamiĝas mi al vi,
salaj kisoj kaj trapiko de la vento.

Maro de trankvilo!
Sunokuloj kaj plektaĵo de la suno,
en l' ombroj aperas rideta la brilo.

Maro de profundo!
Inter viaj ondoj vidas mi konstante
ŝiajn blupupilojn sub la hara blondo.

— El kantliriko "Stornelli Marini" esperantigis

Yi Qiao

La Narcisoj

Nuboj jen deĵoras surĉiele,
alte super verda la ĝangalo.
Oras la narcisoj jam belhele,
kaj flirtante staras en la valo.

Al stelaro ili tre similas,
flagre sur profunda lakta vojo.
Apud rando de la lago brilas,
floroj ĉarm-ridetas kun purĝojo.

Ili etendiĝas al golfeto,
dancas en gruparo kaj laŭvice.

Inspirite miras la poeto,
pro narcisoj belaj ardfeliĉe.

Kun medite mia bonhumoro,
la spektaklo fulmas en la koro.



— Traduke reverkis laŭ la soneta metriko.

Tiom da kantoj estas en mi

Iam kiam mi 'stis nur knabino,
volis mi fariĝi pentristino.
Songojn mi ja pentris laŭ espero,
por mi mem sur la papero.

Poste jam malkovris mi
la potencon de kantmelodi'.
Scias mi, ke vi aŭskulti ŝatas,
tial mi nur por vi kantas.

Tiom da la kantoj estas en mi,
ili estas ponto al vi.
Ĉar nur melodio bela
realigas revon tuj fidela.

Multaj kantoj estas en mi,
sentoplene amas mi tre kanti.
Vi aŭskultas, kie ajn vi estas,
tre proksime al mi ja vi restas.

Melodioj raraj sonas jen jubile,
dotas al la songoj vivon brile.
El nenio ja aperas je subito
la vizaĝo via ridetante kun merito.

Havas sian prezon la feliĉo,
sci' pri tio iĝas mensa riĉo.
Kelkajn kantojn mi jen kantas,
ĝi ne multe al mi kostas.

Vi jam aŭdas mornon ĉe komenco,
en l' unua noto tuj troviĝas la soleco.

Al vi elde ĉie mi sopiras,
“mi tre amas vin”, ĉi tion ĉiu kanto
diras.

Surbaze de germana ŝlagrkanto "So viele Lieder
sind in mir" esperantigis Yi Qiao

Iometa paco

Kiel floro en travintra la momento,
kiel fajro en glacia l' vento.
Kiel pupo, kiun oni ne atentis,
tiel kelkajn tagojn mi ja sentas.

Jen mi vidas nubojn sur la firmament',
kaj aŭdadas kriojn birdaj en la vent'.
Kantas mi pro timo de malluma apatio,
kaj esperas, ke okazos ja nenio.

Iometa paco, iometa sunradi',
por ĉi tero, tie loĝas ni.
Iometa paco, iometa ĝojo,
iometa varmo, mi aspiras dum refojo.

Iometa paco, iomete da revado,
je la homoj sen tiome da plorado.
Iometa paco, iometa ankaŭ am',
ke mi perdas la esperon ja neniam.

Scias mi, ke miaj kantoj ne sin multe
orientas,
mi estas nur knabino diranta kion mi sentas.
Sola mi senhelpa kiel birdo en bruvento,
sentas, ke tuj komenciĝas ŝtorma
krizmomento.

Kantu kun mi nun kanteton tra la spaco,
por ke l' mondo vivu ĉiam en la paco!



— Surbaze de la germana ŝlagrkanto "Nicole -
Ein bisschen Frieden" esperantigis Yi Qiao.

El Ĉina Antikva Poezio

Jiang Kui (1155-1226)

Dediĉe al peoniaj floroj

—laŭ melodio *Belulino Yu*

En ĝardeno okcidenta
mi aprecis umefflorojn jen kun ĝu',
ties delikataj verd-folioj etendiĝis
disen kiel nuboj mincaj en blank-blu'.
Ekster la fenestr' aŭdiĝas flutmuziko
en malvarma vento en nokt-fru'.
En la lito mi rigardas peoniajn florojn
belajn kaj graciajn en sving-sku'.

Kiu ja kompatas ilin
ĉarmajn, ravajn en fascin'?'
Tiuj reĝoj, kiuj ilin ŝatis,
jam forpasis bedaŭrinde laŭ destin'.
Norde de la pavilono muskoj
kovras teron de l' ruin'.
Nur kelkfoje papilioj
jen alflugas pro arom-inklin'.

—laŭ melodio *Ombro de abrikofloroj*

Salikvergetoj verdaj jen karesas super bordo,
kie ambirdoj nestas en la harmoni'.
Tiame mi kaj amatino mia
veturi per la pramboato tie ĉi.
Nun mi direktas ĉagrenplenan ekrigardon
al la ĉielo en printempa ventvari'.
Antaŭ ol forveturi, min klinante
al la remilo mi meditas jen en nostalgi'.

Sur la vojo al la urbo Jinling
hirundoj flugas, orioletoj kantas bele.
Imagas mi, ke nur tajdakvo konas
la homan splenon tute vere.
Ĉe la herbplena insulet' ni haltas,
reveno estas ja neebbla senespere.
Jam proksimiĝas la vesperkrepusko.
Do, kien mia pramo flosu ja prefere?

—laŭ melodio *Helflava saliko*

Kornoj sonas super stratoj
de l' malplena urbo frumatene.
Surĉevale mi, kun sensubŝtofa vesto,
sentas ventatakon kaj skuiĝas treme.
Ĉie sin prezentas helflaveco kaj junverdo
kiel la pejzaĝ' en sudo bela vigloplene.

En gastej' mi dronas en soleco
kaj morgaŭna fastad-tag' des pli
intensigas mian splenon.
Laŭkutime iras al loĝejo ŝia mi
ĉe l' pontkap' por trinki vinon kune.
Mi tre timas, ke pifloroj jen kun apati'
tute falas kaj aŭtuna scen' denove regas.
Paro da hirundoj flugas tien ĉi
por demandi, kie estas la printempo.
Krom verd-laget', neniu certas ja kun sci'.

Sonĝado sur la rivero

—laŭ melodio *Paŝo sur herbo*

Leĝera kiel la hirund' fluganta,
Mild-mola kiel kvivitanta oriolo,
aspektas vi tiel evidente reala
kaj ni re-renkontiĝas en sonĝ-horo.
Riproĉas vi: "Ĉu vi stultulo scias,
ke mi maldormas kun ŝirita koro,
kaj en ĉi-nokt' de fruprintempo
mi infektiĝas je sopir-doloro.

Jen ĉe disiĝo mi donacis al vi
la kudraĵon far mi por memoro
kaj post disiĝo mi leterojn skribas
por montri sopiremon al vi en la foro.
Malvarma lun' en via loko lumas
super la montoj kaj riveroj jen en
mut-soporo.
Lontane vi, ve, senkunule vivas
kaj mizerplene tute en izolo.

Elĉinigiŝis



Vejo (Ĉinio)

Shen Deqian (1673 - 1769)

Pasi tra Xuzhou

Ĉie fluas freŝa akvo. Vasta je cent lioj
kampo per pendantaj plorsaliko sin nebulas.
Brovoj de mi, trapasanto, ŝajnas gaje verdaj;
en ĉirpado de cikadoj mi Xuzhou traveturas.

Li E (1692 - 1752)

La templo Lingyin en luna nokto

En frosta nokto l' templo lume blankas,
sinua fluo ĉe la pord' sin movas.
La luno lumas super montopintoj;
folioj sur ĉi fonta akvo flosas.
L' estaĵoj mutas kaj la universo
silentas, kiam sola lamp' morozas.
Revene mi renkonti tigron timus,
ĉar tiam vent' el rokoj jam nervozas.

Jiang Shiquan (1725-1784)

Jarfine mi atingis hejmen

Plej ĝojas la patrino, kies amo
senlimas, dum jarfine mi revenas.
Vatveston mian vi stebadis dense,
kaj l' hejmleterojn freŝaj ĝisnun tenas.
Ĉe l' vido, vi bedaŭras mian magron,
kaj pri l' vojaĝ' amare ja mienas.
Nu, kiel via filo, mi rimorsas
kaj muton pri ekstera pen' katenas.

Zhao Yi (1727 - 1814)

Rimarko pri poezio

Sennombraj adeptoj surbuŝe heredas
poemojn
de Li Bai kaj Du Fu, senteble nefreŝajn
ĝisnune.
En ĉiu epoko aperas novaj geniuloj,
kiuj poezion kondukas jarcentojn komune.

Yao Nai (1731 - 1815)

Surmonta promenado

Kukoloj superflugas por instigi kultivadon;
ardeoj frapas per flugiloj en sunaj radioj.
Mi iras sur vojeto inter rokoj kaj arbustoj,
aŭdeblas sur montkampoj sono de irigacio.

Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-DUA

Liezi

§32-11

Nenia katastrofo estas pli granda ol la
intenca disvolviĝo de siaj moralaj kvalitoj kaj
la observado per la mensa okulo anstataŭ per
la vidsensaj okuloj. Kiam oni komencas
observi per la mensa okulo, oni ekfaros
supozojn pri ĉiaj aferoj, kaj la supozado
neeviteble kondukos al malbonoj.

§32-12

“La kvin organoj, kiuj kaŭzas
katastrofojn, estas la menso, la oreloj, la
okuloj, la lango, kaj la nazo, el kiuj la plej
ruiniga estas la menso. Estas ĝuste la menso,
kiu igas la homon konsideri sin ĉiam prava
kaj forpuŝi ĉion, kion li opinias neprava.

§32-13

La embaraso havas ok devenojn; la
sukceso tri necesecojn; la korpo ses
viscerojn.

Tiu, kiu superas la aliajn per sia beleco,
sia barbo, sia staturco, sia grandkorpeco, sia
forto, sia eleganteco, sia kuraĝo, kaj sia
rezoluteco, neeviteble falos en embarason.

Tiu, kiu agas konforme al la natura tendenco de la aferoj, ĉiam pretas humile aŭskulti aliajn, kaj kondukas timeme kaj modeste, povas sukcesi ĉiam kaj ĉie.

La inteligenteco kaj la sagaceco faras homojn parademaj; la kuraĝeco kaj la agemo altiras rankoron; la humaneco kaj la justeco provokas riproĉojn. Tiu, kiu komprenas la veran signifon de la vivo, estas grandanima; tiu, kiu estas lerta en uzado de la inteligenteco, estas etanima; tiu, kiu atingis la Grandan Destinon, estas adaptiĝema al la naturo, dum tiu, kiu kaptis nur sian etan destinon, sin submetas al ĝi.

§32-14

Iu havis aŭdiencon de la reĝo de la regno Song, kiu donacis al li dek ĉarojn ekipitajn per ĉevaloj. Li paradis al Zhuangzi per la dek ĉaroj, kaj tiu diris al li:

“Sur la riverbordo vivis familio malriĉa, kiu perlaboris vivrimedojn plektante fragmitajn matojn. Iun tagon la filo plonĝis en la abismon kaj tie trovis perlon valorantan mil mezurojn da oro. La patro diris al la filo: ‘Alportu al mi ŝtonon. Mi rompos tiun ĉi perlon. Tia valorega perlo povas troviĝi nur sur la fundo de la plej profunda abismo, ĝuste sub la mentono de la nigra drako. Kiam vi ĝin prenis, la nigra drako sendube dormis. Se iam ĝi vekigo, tiam certe vin trafos terura katastrofo.’

“Nun la minacanta danĝero el la regno Song estas multe pli granda ol tiu el la abismo. La reĝo de Song estas ne malpli kruela ol la nigra drako. Kiam vi ricevis la dek ĉarojn, li devis esti en dormeca stato. Kiam li pli aŭ malpli frue plene vekigo, vi havos vian korpon frakasita en pecetojn.”

§32-15

Iun tagon, kiam Zhuangzi ricevis inviton, li diris al la sendito:

“Ĉu vi ne vidis la bovon destinitan por oferado? Ĝi estas ornamita per brodaĵoj kaj nutrata per freŝaj herboj kaj faboj, atendente

sian tempon. Kiam la tempo venos, ĝi estos kondukita al la Prapatra Templo por esti mortigita kiel oferaĵo. Tiutempe ĝia vivo ne estos savebla, eĉ se ĝi volus esti vaganta bovo de neniu nutrata.”

§32-16

Kiam Zhuangzi estis mortanta, liaj disĉiploj havis la intencon fari al li pompan enterigon. Sciiginte pri tio, la mortanto diris al ili:

“La ĉielo kaj la tero estos mia ĉerko; la suno kaj la luno estos miaj du jadaj diskoj; la steloj estos miaj gemoj; kaj ĉiuj estaĵoj en la universo estos miaj akompanantoj. Ĉu ne komplete estos mia enterigo? Io ajn alia estus balasta!”

“Ni timas,” diris la disĉiploj, “ke via korpo estos formanĝita de korvoj kaj agloj.”

“Kuŝante sub la libera ĉielo,” diris Zhuangzi, “mi riskos esti formanĝita de korvoj kaj agloj; sed enterigite, mi estos formanĝita de formikoj. Kiel partecaj vi estas intencante forrabi min disde la unuaj por doni al la duaj! Kial do vi tiel favoras la formikojn?”

§32-17

La paco, kiu estas akirita per io, kio ne estas en paco, estas paco nur ŝajna; la pruvo pruvita per io, kio ne estas pruvita, ne estas konvinka. Tiuj, kiuj blinde konsideras sin saĝaj, estas pelataj nur de la famo kaj profito; nur tiuj, kiuj estas transcendantaj spirite, povas perfekte adaptiĝi al la naturo. Tiuj, kiuj rigardas sin kleraj, estas malsuperaj ol tiuj, kiuj estas transcendantaj spirite. Sed la malsaĝuloj ĉiam sentas sin kontentaj pri ĉio, kion ili vidas en la vulgara mondo. Ilia celo en la vivo kuŝas nur en la ĉasado de materiala profito. Kia tragedio!

Elĉinigris



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Yi Qiao (Ĉinio)

Vivrihero

— laŭ ĉinesko *preludo de akva melodio**

En vivrihero
fluas tempo for.
Espereble restu
daŭre l' rava hor'.

Mi arde aspiras
l' eternon de virto
kun juna fervor',
kaj inspiritas
en serena kor'.

La suno
subiras
kun honor'.

En luma krepusko
flagras sankta glor'.

Mi pensas medite
pri la vivsignifo
kun nova aŭror'.

Ni tial preĝu
al Di' kun ador'!

**Preludo de akva melodio (ĉine: Shuidiaogetou)*
ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 9 kaj 10
versoj respektive de 55, 65, 665, 55/333, 47, 665, 55
silaboj laŭ rimaranĝo de xa, xa, xxa, xa / xxa, xa,
xxa, xa (x = senrima)

Memore de juneco

— laŭ ĉinesko *printempo en la ĝardeno*
*Qin**

Frumatene
sunradias
kun birda kver'.

Jen mildas brizo
tra l' fenestro;
Mi vekigās
en freŝaer'.

Reve ni ĵus
renkontiĝis
korafable de sincer'.

Gracie
min ja inspiris
via aper'.

Denova bonveter',
korto komforta de liber'.

Promenadante
mi memoras
l' orajn jarojn
en florprosper'.

Ni 'stis bravaj,
ridetante
kun juneca la fier'.

Ankoraŭ
nun maljunece
restas l' esper'.

* *Printempo en la ĝardeno Qin (ĉine: Qinyuanchun):*
ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 13 versoj
de 444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj laŭ
rimaranĝo xxa,xxxa,xxa,xxa / a,xa,xxxa,xxa,xxa (x =
senrima)

Jadranka Miric (Serbio)

Aŭtunas Majo!

— laŭ ĉinesko *Sopir-al sudo**

Matena
malvarma veter'
Rapida veterŝanĝo.
Subita vento de surter'
forportos leter'.

El nuboj
ekpluvis forte.
Homoj urĝe kaŝis sin.
Multaj fuĝis senvorte
sed iuj honte.

Tagmeze
eliris ja, sun'.

Tero jam sorbis akvon.
Sur branĉo brilo de sun'.

Vesperis kun lun'.

Post pluvo
odoras arbar'.
je freŝeco kaj kaj mildas.
Saniĝas verda herbar'
Vigliĝas bestar'.

Noktiĝis.
Jam silentiĝis
la urbo. Nur vigliĝis
trafik'. Ĉio ŝanĝiĝos.
Baldaŭ tagiĝos!

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).*

Laimundas (Litovio)



Ĉu mi kulpas?

Ĉimatene mia animstato estis precipe stranga. Mi falis de sur lito, unuan fojon en mia vivo. Faladis mi dum la tuta mia vivo; infanaĝe — de sur la arbo, en junaĝo — de sur la tegmento, kaj jen, en plenaĝo mi falis de sur la lito. Tio tre kortuŝis min kaj mi longe kuŝis surdorse kaj pensis. Tamen mi jam ne plu memoris, kiam mi la unuan fojon iris en lernejon, kiam mi studentigis, kiam mi lernis Esperanton, kiam mi eklaboris. Mi pensis, ke mi jam ĉion spertis, ke nenio nova okazos. Kaj ne plu indas ion atendi... Tamen mi falis de sur la lito. Ju pli longe mi kuŝis surplanke, des pli maltrankvile iĝis. Io okazis.

—Pro kio vi kuŝas surplanke?! Leviĝu kaj iru!, —ekkriis mia edzino Sonata.

—Sed kien mi iru?, —mi komprenis nenion.

—Iru vi al doktoro! Vi ne pensu, ke vi estas la plej sana kaj plej saĝa el ĉiuj! — mia edzino ne ĉesis ataki min.

Disputi kun mia edzino, por kiu ĉio ĉiam

klaras, ne indas. Por tia, kiel homoj diras, pli taŭgas lasi vojon. Mi ekstremis kaj sinapogis je lito.

Kiam mi leviĝis, mi estis preta ne subiĝi, sed, kiam mi ekvidis mian edzinon, la decidemo mia elvaporigis. Ne estas pli kolera kontraŭulo ol mi mem. —suspiris mi—. Kiel lin, tiun sentaŭgulon kaj vagabondon, parazitulon kaj inteligenton, venki, subigi?... Mia edzino diras, ke mi strangas. Tamen estas homoj multe pli strangaj ol mi. Nu, kaj kio sekvas de tio? Ĉu tio ege gravas? ...Mi premis la pugnojn kaj direktis min al banĉambro.

—Bona, — diris mi.

Mi ĉiam diradis tiel, kiam mi vidis min en la spegulo. Delonge mi spertis, se mi mem ne dirus al mi bonan vorton, mi neniam ekaŭdus ĝin de iu alia...Mi lavis min, vestis kaj ekiris.

—Kiam vi revenos? —demandis mia edzino.

Dolorigis min tiuj ŝiaj vortoj. Kion ŝi pensas?

—Foririnte vi ne vagabondu ie ajn! — avertis ŝi. —Vi iru rekte al doktoro. Revenante vi aĉetu terpomojn!

Kaj jen mi venis al doktoro. Tiu demandis min.

—Pri kio vi plendas? Kio doloras?

Mi ekstremis kaj diris ĉion, kiel estas:

—Mi ĉion forgesas, mi nenion komprenas, mankas al mi scioj. Mi falis de sur la lito. La vivo preteriras, tamen mi ankoraŭ vivas. Ĉu tio estas malsano aŭ fenomeno de naturo?

—Kiu estas via nomo? — demandis scivoleme la doktoro.

—Mi ne scias, ĉu pro tio, ke doktoro parolis afable, aŭ ke mi estis preta por la plej malbona, okazis la miraklo. Mi respondis facile, kvazaŭ legante libron.

—Mikaelo.

—Kie vi loĝas? — plue demandis doktoro.

